

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

N-ro 400 post 39 jaroj!

Karaj legantoj,

Nia organo, “Novajoj Tamtamas” atingis n-ron 400 per tiu ĉi eldono.


En 1968 oni fondis Jokohaman Esperanto-Rondon (JER) kaj ekeldonis organon “La Tamtamo”, multe en la japana lingvo. En aprilo 1985, junaj membroj Ono Takao(*) kaj Saeki Hiroyuki aperigis kolumnon esperantlingvan nomatan “Novajoj Tamtamas”, kiu celas konigi aferojn japanajn ĉefe al alilandaj legantoj, ene de “La Tamtamo” (foto 1). De januaro 1986, plenaj paĝoj estis dediĉitaj al tiu kolumno, ke oni povu sendi ĝin apartigite de la ĉefa bulteno (foto 2).

De januaro 1989, “Novajoj Tamtamas” aperas paralele kun “La Tamtamo”, kiel aparta bulteno tute esperanta, kaj tiu tradicio ankoraŭ vivas.

Por mi, nuna ĉefredaktoro, impresa estas ties n-ro 100, en februaro 1995; tiujaran januaron, granda tertremo okazis en la okcidenta regiono japana, precipe en Koobe. Tiu numero traktis pri ties damaĝo, kaj ankaŭ dankis alilandanojn por la senditaj simpatiaj mesaĝoj. Nu, en mia tempo okazis granda tertremo kun cunamo en marto 2011 en la Nordorienta regiono de Japanio, kaj ankaŭ nia urbo Jokohamo spertis tremegon, kvankam mem sen granda damaĝo. Kaj nia n-ro 259 en aprilo 2011 raportis pri tio, kun danko al alilandaj legantoj.

En la fina duono de 2020 ni ne povis eldoni tiun ĉi bultenon pro KOVIM, sed lastatempe ni reakiris eldonritmon. Ni kore dankas al niaj enlandaj kontribuantoj kaj eksterlandaj legantoj – via kontribuo estas atendata! (Sibayama Zyun’iti, Redaktoro)

*S-ro Ono Takao bedaŭrinde forpasis en 2008.



■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko

■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)

■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

Gratulaj Vortoj al nia bulteno



400a numero

Dankon al ĉiuj pro viaj mesaĝoj.

el Koreio

La 400an numeron de via bela “Novaĵoj Tamtamas” de NPO Esperanto Jokohama (en Japanio) ni, la redakcio de TERanidO, kiu atingis 330an numeron.

Malgraŭ multaj malfaciloj, via redakcio energie faris la redakton kaj regule sendas viajn numerojn al mia urbo Pusano(Busano), en Koreujo.

El la artikoloj, <Gruo kaj krabo>(N-roj 398-399) (originalo de Akita Uzyaku, tradukita de Sibayama Zyun’iti) estas tre interesa al mi.

Mi esperas, ke via bela revuo “Novaĵoj Tamtamas” regule eldoniĝos kaj atingos la 500an numeron estonte.

Sincere via,

JANG Jeong-Ryeol (Ombro)

el Ĉeĥio

Karaj redaktantoj de Novaĵoj Tamtamas,

Mi elkore gratulas al vi pro la multjara eldonado de via interesa periodaĵo, kiu nun atingas nekredoblan jubilean 400an numeron. Kaj mi dankegas al vi por la afabla regula sendado de ĝi al mi, pro kio mi povas plu teni kontakton kun japana Esperantujo.

Vi verŝajne scias, ke parto de mia koro restis en Japanio, lando, en kiu mi pro diversaj kialoj estis dekfoje, de tio sepfoje pro Esperanto. Kaj eĉ dum tiuj tri alicelaj vojaĝoj mi ĉiam havis iujn kontaktojn ankaŭ kun miaj japanaj amikoj - esperantistoj.

Mi esprimis mian tre pozitivan rilaton al Japanio kaj precipe al japanaj esperantistoj krom en multaj gazetaraj artikoloj eĉ en kvar libroj, du skribitaj en la ĉeĥa kaj du en Esperanto, nome “Ĉinio, Koreio, Japanio, landoj similaj sed diferencaj” kaj “Mia vivo kun Esperanto”.

Do sciuj, ke kvankam mi jam preskaŭ certe ne plu vizitos vian belan landon, anime mi restas parte en ĝi. Kaj mi esperas, ke mi renkontos iujn el miaj japanaj Esperanto-amikoj venontjare dum la UK en la ĉeĥa urbo Brno.

Akceptu ankoraŭfojan gratulon kaj dezirojn, ke vi restu sanaj kaj ke via meritplena redakta laboro daŭrigu ankoraŭ multajn pliajn jarojn.

Amikajn salutojn el Ĉeĥio
al vi sendas Petro Chrdle

el Francio

Ni volas esprimi nian sinceran dankon pro la sendo de via gazeto. Ĝi estas tre aprezata de ĉiuj membroj de nia klubo, kaj ni ĝuas la oportunon legi pri viaj agadoj kaj spertoj. Via klubo gazeto estas inspira kaj fortigas la ligilojn inter niaj kluboj.

Denove, koran dankon pro via sindediĉo kaj amikeco.

Sincere, Sinjoro Marc-Olivier GRAZIANI
(Esperanto Lyon)

(kaj plie, de tiu rondo venis informo: ekstraktita el la letero al Mizro Iwaya.)

Ni eksciis, ke rekordaj varmegaj temperaturoj estis registritaj en Japanio ĉi-somere. Ni sincere esperas, ke niaj japanaj amikoj fartas bone kaj estas en sekuro.


Translokiĝo de Niaj Arkivoj : Niaj arkivoj estos translokitaj al la Biblioteko Diderot en Liono. Tio helpos ilin esti bone konservitaj kaj alireblaj por studentoj kaj esploristoj.

el Belgio

La Internacia Esperanto-Arkivo konfirmas la ricevadon de via revuo, cele al konservado en la Arkivo. Ni kore dankas vin pro la daŭra alsendado.

Ni ĝojas pri la aĉeto de arkivejo en Diest (Belgio), kien baldaŭ la tuta arkivo translokiĝos. Marc Vanden Bempt (Internacia Esperanto-Arkivo vzw)

(Pri tiu IespA, ni raportis en nia n-ro 397)



Prezento de spertoj

En nia Esperanto-Muzeo Jokohama, okazis kutima evento “prezento de spertoj”, en la 16a de septembro posttagmeze. Entute 19 vizitis, kun 10prezentaĵoj.

Ĉi tie ni prezentas la enhavon de la 2 prezentaĵoj.

Vizito al Hongkongo — por postaj vizitantoj

Tojo Joŝijuki

Mi vizitis Hongkongon en aŭgusto, 2024.

Mi manĝis multajn “dimsamojn” (点心) en la teo-domo de Hongkongo. La “dimsamoj” estas delikataj. Ototarton mi ankaŭ manĝis.

La vojoj estas maldekstro-iraj, kaj la pordoj de taksioj aŭtomate malfermiĝas kaj fermiĝas.

Kontanta pago ankoraŭ estas ofta, kaj poŝtelefon-pagado ne estas tute disvastiĝinta, sed kreditkartaj pagoj estas relative oftaj.

En busoj kaj aliaj publikaj transportiloj, vi povas rekte uzi kreditkarton por eniri.

Multaj butikoj ne akceptas la “Alipay” (支付宝) aŭ “WeChat Pay” (微信支付) de la ĉeftero Ĉinio, sed vi povas uzi “Alipay Hongkong” (支付宝香港).

La stratoj de Hongkongo estas mallarĝaj, multaj estas unudirektaj, kaj apude de la zebrozonoj estas okulfrapaj signoj “Atentu dekstren” kaj “Atentu maldekstren”.

La iam abundaj neonsignoj sur la stratoj jam tute malaperis.

Loĝkosto estas alta; per la sama monsumo, vi povas loĝi nur en tri-stelaj hoteloj en Hongkongo, dum en la ĉeftero vi povas loĝi en kvar-stelaj hoteloj.

Teo-domoj kaj kantonaj restoracioj estas alispecaj lokoj; “dimsamo” estas manĝata en

teo-domoj, kaj manĝaĵo en unuopaj pladoj estas gustumataj en restoracioj.

En Hongkongo estas multaj italaj restoracioj, kaj la gusto estas tre aŭtentika, kaj ankaŭ estas multaj hindaj restoracioj.

Rizo ĝenerale estas tajlanda rizo, ne-glueca, tre konvena por kunmiksi kun kareo aŭ “Ĉar Siurizo”.

En la Vaksofigura Muzeo estas multaj figuroj de hindaj filmsteluloj.

Film-DVDoj malaperis en la ĉeftero, sed ili ankoraŭ estas aĉeteblaj en Hongkongo.

La klimatiziloj en konstruaĵoj, metrooj kaj busoj estas tre fortaj, kaj la temperaturo ofte estas sub 20 gradoj.

Estas multaj turistoj el la ĉeftero, kaj en turismaj lokoj plejofte aŭdeblas la mandarena lingvo.

Kiam mi ne povis flue paroli kantone, mi uzis mandarene por komuniki kun hongkonganoj, kaj la plej multaj hongkonganoj komprenas la mandarenon.

En Honkongo, la “Octopus”-karto estas tre utila. Ĝi permesas nin uzi la metroon, busojn, kaj tramojn, kaj ankaŭ pagi en superbazaroj, konvenaj vendejoj, kaj rapidmanĝejoj. Tamen, en taksioj oni povas pagi nur per kontanta mono.



krevitaj ravioloj



ĉinstila vaporumita kokaĵo

En kiu tago mortis Verda Majo?

Sibayama Zyun'iti

Plumnome Verda Majo, japanino Hasegawa Teru, naskiĝis en la 7a de marto 1912 en Japanio, kaj finis sian vivon en 1947 en Jamsu, Ĉinio — certe, sed en kiu tago? **Estas 2 priskriboj, nome la 10a de januaro, aŭ la 14a de januaro, kaj mi opinias ke pli fidindas “la 10a de januaro”. Sed kial tiel?**

Verda Majo eklernis Esperanton en 1932, sekrete edziniĝis al ĉino Liu Ren, studinta en Tokio en 1936, kaj preferis loĝi kun li en Ĉinio en 1937. De tiam ŝi havis severan vivon, interalie, elsendante voĉon kontraŭ la japana milito al Ĉinio. Al la geedzoj naskiĝis filo Liu Sin en 1941, Japanio malvenkis en la milito en 1945, kaj en 1946 naskiĝis filino Shaolan. Sed la severa postmilita vivo igis ŝin malsana, kiam ŝi sciis sian trian gravediĝon en la komenco de 1947.

Ŝi decidis ke oni operaciuj ŝin abortigi la idon, sed en tiama mizera medicina stato ŝi estis infektita de ia malsano, kaj bedaŭrinde forpasis en hospitala lito, pro medicina akcidento, januare ... ĝis tio samas pluraj biografioj ŝiaj, sed ... en la 10a tago aŭ en la 14a tago, laŭ libroj.

Takasugi Itiro, deantaŭa tradukinto japanen de la esperantlingva verko de Verda Majo, skribis ke en la 14a de jan., mortis ŝi, en ŝia biografio datita en 1980 (*1). Mi supozas, ke tiu ĉi cifereca skribo influis biografian datumon pri japanoj (*2) kaj fariĝis fonto de la japanlingva Vikipedio, ĝis la komenco de septembro 2024.

Miyamoto Masao en la librofina biografieto de la Verkaro de Hasagawa Teru japanigita (*3) jam en 1979 skribis, ke Verda Majo mortis en la 10a de jan., ne menciinte fonton.

Iwama Yosiki en sia biografio en 1980 (*4), notis ke ŝi mortis en la 10a de jan. La priskribo

pri ŝia morto estis jena (laŭ mia traduko esperanten), kie s-ino Cunada estis japana flegistino en la ĉina hospitalo:

Teru denove kaj denove petis flegistinon Cunada, en la suferplena spirado, vorton post vorto. La 10an matene, Teru estis alportita al 1-persona ĉambro de la 6-persona ĉambro. Daŭris vivoriskaj statoj.

“Dankon, s-ino Cunada ...”

Teru kun plektitaj manoj preĝis al Cunada.

Kaj en tiu preĝa stato faris la lastan spiron.

Kortuŝa skribo, ĉu ne? Tamen mi supozas, ke tiu ĉi drameca stilo distancigis la verkon el la fidinda historia faktaro, enplektebla en historia datumo. Fakte, Iwama estis la aŭtoro de la televido-dramo pri Verda Majo.

Jena ĉina verko, japanigita (*5) povas esti bona pruvo pri la dato, 10a de januaro.

Konsiderante ĉi-suprajn skribojn, mi modifis la japanlingvan Vikipedian priskribon, ke 2 teorioj ekzistas pri la mortodato. Cetere, esperanta Vikipedia versio nur notas la 10an de januaro, kaj la ĉinlingva versio (維基百科) ne notas la mortodaton.

(referencoj) La libroj (krom*2) estas en Esperanto-Muzeo Jokohama.

(*1) 高杉一郎「中国の緑の星 長谷川テル反戦の生涯」1980-11

(*2) 「デジタル版日本人名大辞典+ Plus」

(*3) 宮本正男編「長谷川テル作品集」、1979-01

(*4) 岩間芳樹「望郷の星 長谷川テルの青春」、1980-05

(*5) 龔佩康 編, 友常一雄日本語訳「みどりの五月: 緑川英子記念」、中国旅遊出版社、1983

sezonvorto septembra

Sairo (さんま)

Okita Kazumi

Longa maldika fiŝo kiu aŭtune venas en la maron proksime de Japanio. Ĝi do estas fiŝo reprezentanta japanan aŭtunon, kaj ornamas la japanan mangotablon en tiu sezono.

Ĝenerale oni rostas ĝin kun salo kaj mangas ĝin kun pikanta raspita rafano. Tamen, la “hashiri” (debutantaj sairoj), kiuj aperas de la fino de aŭgusto ĝis septembro, estas ankaŭ bonguste manĝeblaj sen kuirado kiel saŝimo (*sashimi*).

